
Turangulo

numero 20

4-a trimestro 2010



En tiu numero vi legos..

Multaj famaj verkistoj laŭdis Turenon. Dominique Baron retrovis du tradukojn de paragrafoj de Alfred de Vigny kaj Balzac.	p.1 p.2
Partopreno en kongreso estas agrabla sperto. Dorota Burchardt el Elk, Pollando, raportas pri la Nacia Itala Kongreso 2010.	p.2 p.3 p.4 p.5
Filozofio ne estas en la programo de infanlernejo, sed tamen tie oni povas filozofii... laŭ Bérengère.	p.5
B. Turbillon proponas ludojn.	p.5 p.6
Malkovru spicon altvaloran kiel oro kaj uzu ĝin en la recepto proponita de Franca Cipriani.	p.7
Jean-Louis Le Brizault estas fakulo pri bildstrioj, li klarigas al vi "la naŭan arton".	p.7 p.8

Tureno laŭ du famaj verkistoj

Ĉu vi konas tiun regionon alnomitan "Franclanda Ĝardeno", tiun landon, kie oni spiradas tiel puran aeron en verdantaj ebenaĵoj akvumataj de granda rivero ?

Se, dum someraj monatoj, vi trapasos la belan Turenon, ĉarmitaj vi estos, longe sekvintaj la kvietan Liĝeron ; vi bedaŭros, ke vi ne povis difini sur kia el ambaŭ bordoj vi elektos vian hejmon por tie forgesi la homojn apud estaĵo amata.

Kiam oni akompanas flavan kaj malrapidan ondon de l'bela rivero, oni senĉese surlasas siajn rigardojn en la ĝojigajn detalojn de la dekstra bordo. Valetoj kun belaj blankaj konstruaĵoj, kiujn ĉirkaŭas arbaretoj; montetoj flaviĝantaj per vinberejoj au blankiĝitaj per floroj de fruktarboj; antikvaj muroj kovritaj de naskiĝantaj lonicetoj, rozplenaj ĝardenoj, el kiuj subite eliras alta kaj maldika tureto : ĉio memorigas la fruktodonon de la tero aŭ antikvecon de ĝiaj konstruaĵoj, kaj vin interesiĝas ĉia el la faroj de ĝiaj laboremaj loĝantoj. Nenio por ili estis senutila. Ŝajnas, ke en ilia amo por tiel bela patrujo, sola provinco de Franclando, kiun neniam okupis ia fremdulo, ili ne volis perdi la plej etan spacon el ĝiaj kampoj, la plej malpezan eron de ĝia sablo.

Vi kredas tiun antikvan kaj ruiniĝintan turon nur loĝatan de malbelaj noktaj birdoj ? Pro la bruo de viaj ĉevaloj, ridanta kapo de ia fraŭlino eliras el hederaĵo blankiĝita de la voja polvo. Se vi surrampas monteton per vinberoj kovritan, ia fumeto vin konigas subite, ke kameno estas apud viaj piedoj. Ja eĉ la ŝtonego estas loĝata, kaj familioj de vinberkulturistoj spiras en profundaj kavaĵoj, ŝirmataj nokte per nutrema tero, kiun tage ili laboreme kulturas. La bonaj turenanoj estas simplaj kiel ilia vivo, dolĉaj kiel la aero, kiun ili spiras, kaj fortaj kiel la multepova tero, kiun ili fruktigas. Oni vidas sur iliaj brunaj vizaĝoj nek la frostan senmovecon de Nordo nek la grimacan vivulecon de Sudo; ilia vizaĝo posedas, kiel ilia karaktero, ion el la simplanimeco de vera popolo de Sankta Ludoviko ; iliaj brunaj haroj estas ankoraŭ longaj kaj rondiĝantaj ĉirkaŭ oreloj, kiel la ŝtonaj statuoj de niaj malnovaj reĝoj ; ilia lingvaĵo estas la plej pu-

ra franclingvo, sen malrapideco, sen troa viveco, sen akcento, la lingva lulilo estas tie apud lulilo de l' Monarkio.

El Verkoj de Alfred de Vigny, tradukis Dezertulo. 1904.

Ne demandu min kial mi amas Turenon. Mi ĝin amas nek kiel oni amas sian lulilon, nek kiel oni amas en dezerto la oazon; mi ĝin amas kiel artisto arton amas. Mi ĝin amas malpli ol amas vin; sed sen la Tureno mi ne estos plu vivanta.

El Honoré de Balzac, « Letero al sinjorino Hanska »; tradukis Dezertulo. 1904

Dominique Baron

◆◆◆◆◆◆◆◆◆◆◆

77-a Itala Esperanta Kongreso 08.2010

Mi vojaĝis al Italio kun 18-persona grupo da esperantistoj. Ni forveturis de Bjalistoko la 19-an de aŭgusto kaj en Varsovio aliĝis varsoviaj esperantistoj. Vespere ni atingis sudlandan urbon Bielsko-Biała, kie atendis nin aliaj partoprenantoj de la komuna vojaĝo kaj lokaj esperantistoj, kiuj preparis bongustan vespermanĝon.

Post tranokto en Bielsko-Biała la sekvan tagon matene (la 20-an) ni forvojaĝis al Ĉeĥio, kie ni vizitis belan barokan urbon Olomouc, urbo tre malnova (XII-a jarcento) kun riĉa historio. Dum multaj jaroj ĝi estis la dua post Prago plej granda urba centro. Ĝia graveco iom malgraviĝis post la 30-jara milito – en 1642 la sveda armeo detruis la urbon. Ankoraŭ nun oni povas admiri parton de fortaj urbaj muroj. En la urbocentro troviĝas placo kun malnova belega urbodomo el XIII-a jarcento diskonstruita en XV-a jarcento. Tie estas interesa astronomia horloĝo, multaj fontanoj kaj 35-metrojn alta kolono de Triunuo, konstruita kiel danko post la ĉeso de la pesto, kiu plagis en XVII-a jarcento Eŭropon.



Tiaj kolonoj estas en Ĉeĥio multaj. Tiu en Olomouc estas listigita kiel objekto de la monda kultura heredaĵo. Alia interesa objekto estas neogotika katedralo de la Sankta Vaclavo kun alta turo – 100,66 metra. La Malnova Urbo de Olomouc, kie staras urbodomo kaj la kolono de Triunuo estas alkonstruita en renesanca kaj baroka stilo. Mi sentis nur mankon de verdaĵo – la tuta urboplaco estas nuda, sen floroj, sen arboj ; en la ĉirkaŭaĵo de la urboplaco belaj brikdomoj nur ie tie estis modeste ornamitaj per floroj. Kompreneble nia vizitado daŭris nur kelkajn horojn, do ne ĉion vizitindan ni vidis.

La tago estis bela – suna kaj varma, eĉ tro varma. Post la vizitado ni tagmanĝis kaj veturis pluen al la urbo Mikulov, ĉe la aŭstra limo, kie atendis nin tranokto. La urbeto estas pitoreske lokita kaj vespere ni ankoraŭ iom promenis tra la urbo, sur la urboplaco ni trafis prezenton de danc- kaj kant-popolgrupoj : okazis iu urba festo. La 21-an matene ni jam ekvojaĝis tra Aŭstrio rekte al Italio, al Lignano, celo de nia ekskurso. La vojaĝo tra norda montara parto de Italio estis agrabla, ĉirkaŭis nin montoj kaj aero estis freŝa. Kiam ni forlasis montaran regionon jam ne plu estis agrable, fariĝis pli kaj pli varmege, aldone ni veturis limakrapide pro la ŝtopitaj vojoj. Varmego akompanis nin dum la tuta restado en Italio. Lignano situas ĉe la Adriatika maro inter Venecio kaj Triesto. Ĝi estas tipa ripozloko kun multaj hoteloj por feriantoj. Nia hotelo, kie troviĝis la kongresejo situis meze de tiu longa urbeto (vilaĝo ?) proksime de la maro, de kiu apartigis nin nur strio de pina arbaro. La prok-

simeco de la maro estis bonega afero, ni povis eĉ kelkfoje tage naĝi, refreŝiĝi en la akvo.



La hotelo bedaŭrinde ne estis klimatizita kaj en ĉambroj estis tre varmege kaj sufoke. Ankaŭ en ĉambroj kie okazadis la kongresaj programeroj estis varmege. La programo de la kongreso ne estis elstare interesa, tamen la arta programo estis tre bona. Ĉiutage okazadis lecionoj pri esperanto por komencantoj (Anna Löwenstein) kaj por progresintoj (Gražina Opulskiene), seminario pri "lingvaj rajtoj en EU", dum kiuj mi eksciis, ke lingvoj artefaritaj kaj minoritataj ne estas subtenataj de EU. Krome, laŭ la preleganto (Zlatko Tišlar) EU ne havas jure difinitajn "lingvajn rajtojn", do esperantistoj ne povas sin apogi sur iu ajn paragrafo, pledante pri la lingvo esperanto. Tamen EU klopodas establi "Tagon de Interpretistoj". Tre interesa estis prelego "Esperanta kulturo – ĉu parazito?" La preleganto pruvadis, ke esperanta kulturo ne nur ĉerpas el naciaj kulturoj, sed ankaŭ enportas ion en naciajn kulturojn pere de kulturaĵoj kreitaj (verkitaj) esperante kaj tradukitaj al naciaj lingvoj. Multaj planitaj (interesaj laŭ temo) programeroj ne okazis pro ne alveno de prelegontoj. Kaj plej seriozaj diskutoj okazadis ĉiutage... je 23.00-24.00 – pri homaranismo. Ĉiutage okazadis ankaŭ rapidlernado pri itala lingvo. Je la 21.30, post vespermanĝo, okazadis koncertoj. Koncertis Jo-Mo, Mikaelo Bronstein, iu franco, kies nomon mi ne scias, li belege kantis kaj akompanis sin mem per piano. Tiuj tri koncertoj okazis sur la korta sceno, inter pinaro, prilumigita ne nur per lampoj, sed ankaŭ per la luno. Koncerto de Amir okazis ĉe plaĝo, tre bona koncepto. Aliaj koncertoj – de Ĵomart kaj Nataŝa, Georgo Handzlik kaj internacia vespero okazis en granda salono Zamenhof. Georgo Handzlik prezentis sian bonegan monodramon "D-ro Esperanto". Georgo Handzlik kun Mikael Bronstein tre sprite gvidis internacian vesperon, dum ni malkovris diversajn grupojn kaj solulojn. Ili prezentis kantojn, deklamis poeziaĵon, rakontis spritaĵojn – do la programo estis tre varia kaj amuza. Kaj ... Imagu, ĉiutage estis nokta programo de la 24.00 ĝis la 05.00 matene por la plej rezistantoj. Dufoje dum tiuj noktaj programoj estis gustumado de diverslokaj italaj pladoj kaj vinoj. Mi ne eltenadis tiom "intensan" programon kaj plej ofte post la 24.00 mi provis dormi, se varmego tion permesis.

Merkredo estis kiel kutime, ekskursa tago. Nia grupo vizitis per propra buso Venecion. La buson ni lasis en Mestre, la kvartalo de Venecio sur la firma tero kaj de tie ni veturis per trajno al Venecio antikva, kie ne estas aŭtotrafiko. La urbo apartenas nur al piedirantoj kaj akvotramoj kaj boatoj, uzataj kiel transportiloj, i.a. famaj "gondoloj". Mi vizitis la urbon la unuan fojon kaj ... mi estis iom seniluziigita. Ĉiuj arkitekturaj mirindaĵoj pli belas sur bildkartoj, en gvidlibroj ol en realo : same estas pri Venecio. Kompreneble ĝi havas specifan ĉarmon (manko de aŭtotrafiko estas aparte ĝuinda). Estas tre belaj preĝejoj, domoj, sed ankaŭ domoj en tre malbona stato, kun likenoj surmuraj. En tiu malnova, plej pitoreska parto de Venecio loĝas nur ĉirkaŭ 50 mil loĝantoj, plej multaj loĝas en Mestre. Mi komprenas, ke ĝi estas tre grava kulture, arkitekture, sed loĝi tie mi ne ŝatus. Min persone plej impresis "Basilica S. Maria Gloriosa Dei" – grandega preĝejo kun pentraĵo de Ticiano en altaro (ĉieliro de Dipatrino). Ĝi apartenas al ariĝo de franciskana monaĥejo, kiu ekestis en XIII-a jarcento. Ĝis nun la baziliko de ekstere kaj interne prezentas nur modeste nudajn brikojn. Ĝi estas grandega. Dum la baziliko de la Sankta Marko estas interne



tre riĉe (belege !) ornamita, la baziliko de "S. Maria Gloriosa Dei" estas tre modesta, sed tre granda. Plaĉis al mi mallarĝaj stratetoj de Venecio kun multaj maskvendejetoj. Ĉio ĉi estas pitoreska por viziti, sed ne por loĝi.

Duontagan ŝipekskurson ni faris al bela naturparko ĉe la rivero Stelo. Ĉu ĝia nomo vere estas Stelo, ĉu nur esperantigita ? Mi ne scias. Ĝiajn bordojn ĉirkaŭas marĉa tereno tre taŭga por birdaro, kaj ĉe unu el la bordoj troviĝas "antikva" vilaĝeto, konsistanta el kelkaj kabanoj konstruitaj el kano. Ĉiu el ili troviĝas kvazaŭ sur aparta insuleto, do ne ekzistas danĝero, ke la najbaro forprenos (ŝtelos ?) parton de via tereno. Kaj tie vere vivas homoj kiuj vivtenas sin per fiŝkaptado. Estas mirinda loko, kvazaŭ la tempo haltis tie.

Alian tuttagan ekskurson ni faris al Triesto (Trieste) – kosmopolita urbo. La urbo multfoje dum jarcentoj pasis de manoj al manoj de diversaj regantoj. En la jaroj 1947-1954 ĝi estis eĉ ***Libera Teritorio De Trieste*** en kiu vivis italoj (75%) kaj slovenoj. En la jaro 1954 ĝi estis dividita inter Italion kaj Jugoslavion. En la urbo en la XIX-a kaj komence de la XX-a jarcento volonte loĝis diversnaciaj artistoj, scienculoj, verkistoj ; ĝis nun en tiu urbo havas sidejojn multaj internaciaj scienc-esploraj asocioj. En la urbo troviĝas bonege ekipita konferenc-centro en iama fiŝhalo. Eble ĝi ne estas elstare bela arkitekture, sed la interno estas ekipita tre moderne. La urbo estas famekonata kiel "Urbo de Scienco". Tutcerte pro tio la urbo posedas parkon de famaj homoj. Tie staras multaj bustoj de famaj komponistoj, verkistoj, sciencistoj. Nun ili ne plu babilas inter si, sed konkorde flaras odoron de floroj kaj aŭskultas ĉirpadon de birdoj. Nun la urbo perdis sian gravecon kaj junaj loĝantoj forlasas ĝin. Mi ne sciis, ke dum la dua mondmilito en Triesto estis granda geto kaj proksime de la urbo estis granda krematorio, kie nazioj neniigis judojn. En la urbo troviĝas belega granda sinagogo. Super la urbo leviĝas ruinoj de kastelo el 1290 (komenco de la konstruo), la kastelo de princoj Lichtenstein. Sur la sama monto troviĝas katedralo, ankaŭ tre malnova, granda, romstila el la XIV-a jarcento – baziliko de Sankta Giusto. Mirigas nin en la urbo multaj fontanoj, sed sen akvo. Ĉu la urbo ŝparas ?



Estinte en Triesto oni devas nepre viziti la kastelon Miramare, troviĝanta ĉirkaŭ 5 km nord-okcidente de la urbo. La kastelo estis konstruita en la XVIII-a jarcento por Ferdinand Maximilian, la frato de la imperiestro Franz Joseph. La princo Ferdinand Maximilian ekloĝis tie kun sia amata edzino Charlotte. Kun la kastelo estas ligitaj diversaj legendoj, kiel preskaŭ kutime. Probable neniu loĝanto de la kastelo estis feliĉa. La kastelo estis konstruita sur roko preskaŭ pendanta super la maro. Ĉirkaŭas ĝin belega parko, kiun ekplanis Ferdinand mem. Ĝis nun ĝi estas en tre bona stato, zorge flegata. Post la morto de Ferdinand, Charlotte forlasis la kastelon kaj ĝi servis kiel somera rezidenco de Habsburgoj. Nun tie estas muzeo (de 1955). Gvidis nin tra la urbo kaj kastelo Viŝnja, la loka esperantistino, kiu bonege konas la urbon kaj ĝian historion.

Sep kongresaj tagoj pasis fulmrapide kaj ni devis paki niajn aĵojn. Sabate, la 28-an post tagmanĝo, ni estis pretaj por forveturo. Plu estis varmega sennuba vetero kaj plej volonte ĉiu el ni irus al la maro, sed ni devis adiaŭi amikojn, gastaman Lignanon kaj iri hejmen. Denove ni veturis tra Aŭstrio al Mikulov, kie ni tranoktis kaj la 29-an ni komencis pluan vizitadon de Ĉeĥio. Post trapaso de la limo itala-aŭstra fariĝis jam pli malvarme, freŝe, de tempo al tempo tro freŝe pro pluvo. Sed en Ĉeĥio denove ni havis belan veteron, sed ne plu varmegan. Nun ni vizitis grandiozan kavernon Punkevni. La naturo skulptas (kreas ?) plej mirindajn formojn. Mi opinias, ke pli mirindaj ol la homo... Vizitado daŭras 40 minutojn, ĉirkaŭ 20 minu-

tojn la vizitantoj estas transportitaj boate tra subtera rivero kaj du lagetoj. La vojo al la kaverno ankaŭ estas ĉarma, kondukas tra montara tereno. Satiĝinte okuloj per la naturbelaĵoj ni iom malsatis, do ni veturis al la urbeto Kromeriz (Kroměříž). La urbeto ankaŭ estas tre malnova, ĝi ekestis kiel setlejo jam en la XIII-a jarcento.Tie atendis nin loka esperantisto, kiu post tagmanĝo montris al ni vidindaĵojn de sia belega urbeto. La urbeto estas tre pura kun ĉarma urboplaco, tri tre vizitindaj barokaj preĝejoj kaj episkopa kastelo ; nun troviĝas tie muzeo, biblioteko, antikvaj salonoj en kiuj estas prezentataj valoraj famaj pentraĵoj. Bedaŭrinde estis tro malfrue por ĝin viziti. Ni devis atingi Sudpollandon vespere.

Nia lando akceptis nin kun pluvo kaj malvarmo ... Varmigis nin rememoroj pri belaj varmaj (ĉiusence) tagoj kaj travivaĵoj dum tiu mallonga tempo.

Dorota Burchardt

Filozofio en franca infanlernejo

- Kio estas feliĉo ?

- *Kiam oni alvenas antaŭ la aliaj.*

(antaŭ la aliaj = frue, en la franca, feliĉo tradukiĝas per « bonheur » kaj frue per « de bonne heure »).

- *Kiam mi ricevas la kristnaskajn donacojn.*
- *Kiam mi ricevis biciklon por mia datreveno.*
- *Kiam mi iris al cirko.*
- *Kiam mi estas sola kun Panjo.* (iom timema blondulineto)
- *Kiam mi dormas kun mia hundo. !!! ???*

Jeanette, sesjara , al la instruistino :

- Vi havas 22 jarojn kaj vi ne edziniĝis.
- Kiu rakontis tion al vi ?
- Mia granda fratino.
- (Iom sekrete) Kial ci ne havas edzon ?
- Ĉar mi ne renkontis sufiĉe belan sinjoron.
- Sed, mia Pacjo, li estas bela. (estas la leterportisto.) !!!???
- Diru, instruistino. Kiam oni estas morta, oni estas tute morta ?

Gravega demando. Halto de la legada lekciono. 25 paroj da okuloj rigardas la kompatindan instruistinon. Instruistino scias ĉion, ĉu ne ! Do, respondu !

Jes, devas esti respondo. Ne gravas la personaj ideoj. La respondo devas konveni kaj al la infanoj kaj al la gepatroj. Post mallonga momento venis unu respondo : " Estus vere tro triste." Ĉu vi trovus pli bonan ???

HELPU ŜIN

Mandareno ŝuldis grandan sumon al vidva magnato. Tiu lasta diris al la mandareno:" mi deziras edziĝi kun via bela filino. Ŝi mem decidos dum la edziĝfesto pri via ŝuldo. En saketo estos du globetoj, unu blanka, unu nigra. Se ŝi eltiras la blankan, via ŝuldo estos nuligita, se ŝi eltiros la nigran, via ŝuldo restos. Sed la junulino scias ke, en la saketo estas nur du nigraj globetoj.

Kion fari por nuligi la ŝuldon sen hontigi la estontan edzon ? Ŝi trovis belan solvon. Ĉu ankaŭ vi ? Pripensu… (solvo en venonta T.L.)

Bérengère Turbillon

Solvo de la ludo proponita en T.L. 19
Lokigu korekte la literojn por trovi vorton

E	S	P	E	R	A	N	T	O
1	2	3	1	2	3	1	2	3

1 = I ; E ; N 2 = S ; T ; R 3 = P ; O ; A

P	A	R	T	I	C	I	P	O
1	2	3	1	2	3	1	2	3

1 = I ; P ; T 2 = A ; I; P 3 = O ; C ; R

LA MALLERTA VITROLAVISTO

Kredu aŭ ne, sed dum la unua laborsemajno de la vitrolavisto Bert okazis al li kvin incidentoj. Li konservis sian laboron, feliĉe, sed sian unuan laborsemajnon li neniam forgesos ! Por scii kio kiam okazis al li : legu atente la ĉi-subajn indicojn.

Indicoj:

1. Iun posttagmezon li ne kuraĝis malsupreniri de sia eskalo ĉar timiga hundo tie grumblis al li. Tio estis du tagoj antaŭ la incidento en Stacistrato.
2. Ĵaŭde oni forŝtelis lian sitelon, sed tio ne okazis en Lekantostrato.
3. Merkrede, je la 15a horo, denove misiris. Sed ne estis tiam ke li lavis ĉe la malĝusta - najbara - adreso.
4. La marda incidento ne okazis je la 11a horo.
5. En Parkstrato, Bert rompis fenestron. Pli frue en la semajno, li spertis malfeliĉon je la 13a horo.
6. Lunde oni povis vidi Bert labori en Jupiterstrato.

<u>Kiel solvi logigramon?</u>

Metu **+** simbolon en la diagramo ĉe afirmaj indicoj aŭ **-** simbolon ĉe neaj indicoj.

<u>Ekzemplo:</u>

Ni devas trovi la aĝojn de 3 gefratoj (Paŭlo, Petro kaj Pjotro) kaj ilia respektiva donaco.

Indicoj:

1. Paŭlo estas la plej aĝa.
2. Petro ricevas biciklon.
3. La plej juna ricevas diskon.

<u>Solvo:</u> Paŭlo estas la plej aĝa (1), metu **+** simbolon en la respektiva loko en la diagramo kaj samtempe **-** simbolojn ĉe la nekorespondaj aĝoj. Se Petro ricevas biciklon (2), vi ankaŭ povas konkludi ke ĝi ne estas la donaco de la plejaĝa, ĉar la plejaĝa nomiĝas Paŭlo. (Metu **-** simbolon en la koresponda ejo en la diagramo.)

La plej juna ricevas diskon (3), metu **+** simbolon en la respektiva loko, **-** simbolojn ĉe la aliaj. Vi povas nun konkludi ke la 15-jaraĝa (tio estas Paŭlo) ricevas puzlon kaj la 14-jaraĝa la biciklon. Metu la simbolojn. Fine, vi povas vidi ke Pjotro ricevas la diskon. (Provu mem kompletigi la diagramon kaj resumi viajn konkludojn.)

	15	14	12	biciklo	disko	puzlo
Paŭlo	+	-	-	-		
Petro	-			+	-	-
Pjotro	-			-		
biciklo	-		-			
disko	-	-	+			
puzlo			-			

		INCIDENTO					TEMPO					STRATO				
		SITELO ŜTELITA	FALIS	HUNDO	ROMPIS FENESTRON	MALĜUSTA	10	11	13	14	15	STACISTRATO	JUPITERSTRATO	FAZANALEO	LEKANTOSTRATO	PARKSTRATO
TAGO	LUNDO															
	MARDO															
	MERK.															
	ĴAŬDO															
	VENDR.															
STRATO	Statcistr.															
	Jupiterstr.															
	Fazanaleo															
	Lekantstr.															
	Parkstr.															
TEMPO	10:00															
	11:00															
	13:00															
	14:00															
	15:00															

TAGO	INCIDENTO	TEMPO	STRATO

Spico altvalora kiel oro

En mia regiono, ekde mil jaroj, oni kultivas herban planton, kiu fariĝis produktosimbolo de la monta Abruco : Safrano (Crocus Sativus L.)



Origina de Oriento, uzita ankaŭ kiel flava tinkturo por satenetoj, ĝi estis enmetita en Mediteranean basenon de Araboj (za' faràn) kaj en Eŭropon fare de Krucistoj. Pratempe ĝi estis konata pli pro ties medikamentaj ol kulinaraj proprecoj.

Safrano estas bulba planto, kiu ne vegetas spontane kaj ties violkoloraj floroj (3 aŭ 5 po 1 planto) ekfloras ĉirkaŭ la fino de aŭtuno. La abrucaj kamparanoj plukas ilin frumatene, antaŭ ol ili malfermiĝos, kaj de la koroloj eltiras zorge dum duonmonato la oranĝkolorajn stigmojn. Ĉi tiujn poste, enfermitajn en kribilo, ili sekigas sur braĝo el kverko- aŭ migdaloligno.

Por akiri kilon da seka safrano, la kultivistoj devas rikolti 130000 florojn. Pro tio la spico multekostas (g.1 egalas ĉirkaŭ € 12). La abruca safrano, tre utiligita por la kuirado, donas apartan aromon al diversaj pladoj kaj estas estimata la plej bona en la mondo.

Nokoj kun safrano

- *Infuzu 2 stigmojn de safrano en iom da bolvarma akvo ;*
- *boligu g. 800 da terpomoj, senŝeligu kaj premu ilin ;*
- *kunigu g. 200 da faruno, 2 ovojn, g. 40 da raspita fromaĝo kaj miksu ĉion ;*
- *estigu ŝnuregojn kaj tranĉu ilin trae por obteni rombojn ;*
- *kuiru la nokojn en salita akvo ĝis ties ekapero ;*
- *senakvigu kaj metu ilin en supujon ;*
- *kondimentu per g. 40 da solvita porkograso (aŭ olivoleo) kaj 1 folio de salvio ;*
- *aldonu la filtraĵon el safrano kun g. 40 da ŝafa fromaĝo.*

Bonan apetiton!

Franca Cipriani

● ● ● ● ● ● ● ● ● ● ● ●

BILDLITERATURO KAJ ESPERANTO

Kio estas bildliteraturo ?

En la artikolo *Cent jaroj Yellow Kid -Jarcentoj da bildliteraturo*, Martin Weichter klarigas la demandon : Kio estas bildliteraturo ?

Oni uzas plurajn vortojn por tiu ĝenro kaj povas diri ke "bildliteraturo" estas la plej ĝenerala vorto.

Oni nomas ĝin **La Naùa Arto** aù "**sekvenca* Arto** ". *Sekvenco : serio de bildoj aŭ scenoj, formanta kunaĵon, eĉ se ili ne okazas en la sama dekoracio (PIV). Ĝi estas la arto "rakonti per apudmetitaj bildoj".

En moderna epoko, al la 7 artoj (Trivium : gramatiko, retoriko, dialektiko / Quadrivium : astronomio, aritmetiko, geometrio, muziko) oni aldonis : la kinarton kaj la bildliteraturon.


En la praaj rakontoj, oni uzis sinsekvojn de bildoj, sed teksto estis skribita aparte kiel sur la Tapiŝo de Bayeux.

Bildsekvo per sia sekvenco malfermis alian dimension al bildarto : **la tempan dimension.** Same kiel inter fotoj kaj silentaj aŭ parolaj filmoj.

Ni povas diri "**ni rigardas**" bildon, sed ni "**legas bildrakonton**", eĉ se tiu bildrakonto ne havas vortojn.



La unua paŝo estis speco de bildrakonto, kiun oni nomas **teksgvidita**. Tie la vortoj ne estas *en* sed *sub* la bildo kiel en "**Mickey aviadisto" (eldonita en la franca lingvo**).



Mickey grimpe dans l'avion, s'installe et examine avec curiosité les commandes. « Oh ! que je suis content !... Pilote de grande ligne ! Mon rêve... Je me demande ce qui arriverait si j'appuyais sur ce bouton. Ah ! mon Dieu ! L'avion s'est mis en marche... Oh là ! A l'aide ! Arrêtez l'appareil ! »

Poste, la bildrakonto integris parolantajn vortojn en la bildojn, oni nomas tiun **bildgvidita** rakonto, ĉar la bildoj devas transpreni la taskojn, kiujn la teksto havis.

Oni povas uzi aliajn vortojn :

- **Grafika literaturo** (tiu vorto estis kreita de Will Eisner).
- **Bildaturo :** neologismo analoge al bildliteraturo (el la mangao "La flambirdo").
- **Komikso :** (el la angla *"comics")* ekvivalento de bildrakonto;
- **Bildromano** : ekvivalento de komikso aŭ bildrakonto;
- **Bildstrio** : ekvivalento de bildrakonto. Ekzemple, en la prezentado de la "eta Spiru'", oni skribis : "Spiru', famega heroo de ĉiupublika bildstrio… ") eĉ se tiu vorto ne estas en la PIV !
- **Mangao :** la japana vorto *Manga,* laŭvorte "komika desegnaĵo", estas tre vastasenca. En la komenco ĝi signifis karikaturon, sed nuntempe signifas ankaŭ (aŭ ĉefe) multepaĝan bildstrion, kiu respondas al noveloj kaj romanoj en literaturo. (defino el la mangao "la flambirdo").

EROJ uzataj en bildliteraturo :


Bildo : baza ero ĝenerale lokita en kadro, sed ne ĉiam kiel ĉe "La mondo kiel ĝi iradas" de Serge Sire, KKK Krestomatio)



Strio : aro da bildoj kiu estas organizataj linie.


Plato : aro da strioj en unu nura paĝo.

Veziko : spaco uzita por skribi la parolojn de la rolantoj. Ili estas ekipitaj per "vosto" kiu direktiĝas al la parolanto. Pinta vosto kiam temas pri laŭtparolaj vezikoj, serio da veziketoj kiam temas pri nur mens-parolaj vezikoj.



Koment-fako : por diversaj klarigoj.

Onomatopeo : kiun oni desegnas rekte en la bildo. Povas esti "legeblaj bruoj" kiel "krak, plaŭ, onka, gh , zzzz", (Ratman p11-12)



En la sekvanta Turanĝia Luko, mi prezentos unu el la du mangaoj, kiuj estis eldonitaj en esperanto : *Nudpieda Gen,* verko de Nakazawa Keizi.

Jean-Louis Le Brizault

Preparu artikolojn por la venontaj Turanĝiaj Lukoj kaj donu aŭ sendu ilin al la grupanoj, kiuj kuniĝas ĉiujn merkredojn, tiel ili relegos kaj korektos ilin se necesas.

Centre Culturel Esperanto Touraine
Halles de Tours
Place G. Paillhou
37000 TOURS
Tel : 02 47 44 62 12
esperanto-touraine37@wanadoo.fr